

Baza kurso

pri

fotografio



Lode Van de Velde

Baza kurso pri fotografio

0. Enkonduko

Ĉiu kiu posedas fotilon povas foti, ĉu por fiksi familiajn kaj turismajn memoraĵojn, ĉu por profesiaj celoj.

Fotografio fariĝas Artformo kiam la fotisto celas esprimi sin aŭ esprimi ion, kaj kiam la bildo troviĝas jam en la kapo antaŭ la premado de la butono.

Kaze de spontanea fotografio, la interna okulo rimarkas ion kaj volas registri tion. Ĉe planita fotografio okazas simile: la fantazio, imago havas ideon kaj oni volas realigi tion. Tiucele, la fotisto prenas la aparaton kaj provas kapti per la fotilo tion kion vidis la 'interna okulo'. Simile, pentristo havas inspiron, komponisto havas melodion en la kapo, kaj poste ili surkanvasigas aŭ surpaperigas tion. Tio estas la vera fotografio kiel artformo.

Por spontanea fotografio, gravas atenti detalojn, rimarki ion kio ripetiĝas, vidi tion kio estas nekutima aŭ interesa. Gravus rigardi la mondon per aliaj okuloj. Kaj same kiel pentristo-lernantoj unue rigardis siajn mastrojn, ankaŭ fotemuloj povas rigardi la 'grandajn' ekzemplojn, la 'grandajn' fotografojn. Kaj rigardante oni demandu sin "Kial mi ŝatas tiun foton?", "Kion ĝi diras al mi?", "Kion la fotisto volis diri per ĝi?". Kaj eble: "Kiel li/ŝi realigis tiun foton?"

Poste, starigu la samajn demandojn pri viaj propraj fotoj. Kaj, se vi bone rigardas kaj sukcesas registri tion kion vidas la interna okulo, vi ne havos problemojn respondi la ĉi-suprajn demandojn. Kaj vi estas sur bona vojo.

Laste, same kiel pentri, necesas multe ekzerci kaj aŭskulti alies opiniojn. Sed ankaŭ: ne ĉiam blinde akcepti alies opiniojn. Ne malofte okazas ke alia fotisto envias belan foton kaj tial aĉe kritikis ĝin. Foje, konsciu ke tio estas komplimento!

1. Bazaj principoj

1.1. Enhavo de la foto

Spektante bonan foton, vi devus trovi la respondon al almenaŭ unu el la jenaj demandoj:

1. Kial la fotisto faris la foton? (celo)
2. Kion la fotisto volas montri aŭ esprimi per la foto? (enhavo)

Ankaŭ al vi mem, demandu: "Kio igas mian foton interesa?", "Kial homoj volus rigardi ĝin?"

Pri la celo de la foto, tio povas esti same diversa:

- | | | |
|-------------|------------|------------|
| - memoriĝi | - intrigi | - konatigi |
| - amuzi | - plaĉi | - miri |
| - konsciigi | - misgvidi | - simpatii |
| - ŝoki | - raporti | - ... |

Pri la enhavo de la foto, pluraj aspektoj povas esti interesaj:

- | | | |
|----------------------|---------------|------------------|
| - memoraĵo | - kontrastoj | - strukturo |
| - koloroj | - anomalio | - kadukiĝo/rusto |
| - perspektivo | - mistero | - homoj |
| - geometriaj figuroj | - emocio | - ... |
| - paralelaj linioj | - abstraktaĵo | |

Do, zorgu pri tio ke via foto estu iel interesa. Aliflanke, konsciigu ke gustoj varias. Foto de familianoj povas plaĉi al via partnero, sed diri nenion al iu persono kiu tute ne konas ilin. Inverse, foto de rusta biciklo povus rave entuziasmigi iun personon, sed diri nenion al via partnero. Do ne seniluziĝu de 1 negativa komento! Alia bona kialo por fari foton povas esti simple "ĉar plaĉis al mi". Kaj ĉu tio ne esence estas la plej grava kialo?

Laste, subjektoj en la fotoj estas tre variaj kaj eĉ sub influo de lasta modo. Dum iu tempo, nigra-blankaj fotoj fariĝas furoraj, dum alia periodo, rustaj objektoj estas popularaj kaj tiel plu.

Samtempe ekzistas pluraj kliŝoj, do fotoj jam tiel ofte faritaj ke ili ne plu estas konsiderataj 'freŝaj' aŭ 'novaj'. Ekzemploj de tio estas:

- siaj propraj piedoj dum oni mem staras aŭ kuŝas
- sia propra ombro sur strato aŭ herbejo
- lampo kiu brilas
- iu konstruaĵo aŭ arbo reflektita en flako sur strato
- ŝtuparo kiu (pli-malpli) spirale supreniras
- sunsubiro

1.2. Rigardu alimaniere: la celilo

Lajkoj simple rigardas la pejzaĝon aŭ la kastelon, la partneron, kiun ili volas foti tra la celilo, sen priatenti la celilon mem, sen atenti pri kiel aspektos la subjekto en la rektangulo kiu estos la foto poste. Fakte, oni devus rigardi ne nur la kastelon, sed ankaŭ la randojn de la celilo mem, ĉar ili formas la randojn de la posta foto.



Por scii kiel aspektos la foto sur ekrano aŭ sur papero, ne rigardu nur TRA la celilo – aŭ – en la plej novaj fotiloj – sur la ekraneton, sed rigardu kiel aspektas:

- la temo relative al la randoj de la celilo, ĉar tiuj relative al la randoj de la posta papero foto;
- la temo en ĝia ĉirkaŭaĵo.
- ĉu ne estas objektoj kiuj ĝenas?

Kelkaj bazaj teknikaj aferoj por priatenti :

- ĉu la horizonto estas horizontala*?
- ĉu la horizonto tranĉas la foton en du partojn?
- kie troviĝas la suno kaj la korespondaj ombroj?
- kie troviĝas via propra ombro?
- ĉu la bildo estas neta?

Fine, provu eviti ke gravaj elementoj de la foto troviĝas sur la rando de la foto, kio ne aspektas estetike.

1.3. Proksimiĝu al la subjekto!

Proksimiĝante al la subjekto, oni pli bone vidas kio estas la temo de la foto, kaj pli bone konatiĝas kun la subjekto. Foto estas multe pli esprimiva kiam oni ne devas serĉi kio estas la subjekto kaj kiam la atento restas ĉefe fokusita sur la subjekto, sen ke la okuloj vagas al ĉiaj aliaj flankelementoj kiuj povas troviĝi en foto. Do, observu la leĝon de neceso kaj sufiĉo.

Se ne eblas surloke proksimiĝi pli, zomu. Se ne plu eblas proksimiĝi nek zomi, sed la fotilo registras sufiĉe grandan bildamplekson (ekz. pli ol 5 megapikseloj), hejme eltranĉu la esencan parton de la foto pere de softvaro. Ja antaŭe oni faris simile en obskura ĉambro, aŭ poste, pere de paspartuo kiu kovras ne-utilajn partojn de la foto.

Alia foje utila truko estas forigi la kolorojn el la bildo, rezultante nigra-blankan foton. Pri tio, vidu ĉapitron 8.1.

1.4. Ora Tranĉo aŭ: Regulo de la Trionoj.

Okuloj dum observado aŭtomate restas pli longe en certaj lokoj ol en aliaj lokoj!

En plej multaj modernaj fotiloj, oni povas elekti agordon tiel ke aperas 4 linioj sur la ekrano: 2 horizontalaj kaj 2 vertikalaj. La du vertikalaj, respektive horizontalaj linioj dividas la foton dufoje en 3 egalajn partojn. La horizontalaj kaj vertikalaj linioj renkontiĝas en 4 punktoj, la t.n. 'fortaj punktoj'. Objektoj prefere estu lokitaj en tiuj lokoj, kiuj nature ricevas pli da atento. Tion sciis kaj instruis jam la klasikaj pentristoj.



Vertikalajn objektojn oni prefere metu sur unu el la vertikalaj (imagaj) linioj. Horizontalaj objektoj (aŭ linioj) prefere troviĝu sur unu el la horizontalaj linioj. Tial, en paragrafo 1 estas skibita averto ke la horizonta ne tranĉu la foton en du. Ĉar ĝuste tio okazas kiam ĝi situas en la mezo!

Do, kie ja loki la horizonton? Ĉu sur la supra, aŭ la suba linio? Tio dependas: se la antaŭa parto de la foto estas interesa, prefere metu la horizonton supre. Se male, la fono aŭ la ĉielo estas pli interesa, tiam metu la horizonton pli sube.

Ĉu do neniam objekto povas esti en la mezo de la foto? Certe jes! Kiam oni faras portreton ekzemple, kaj la subjekto estas tre proksima, la foto fariĝas konfronta. Do veran arton oni akiras kiam oni, konante la regulojn, scipovas lerte malobei la regulojn!! Sed ĉu vere oni malobservas la regulon se oni ekzemple vizaĝon en la mezo? Ĉu ne la okuloj troviĝas en la fortaj punktoj?

Multaj portretoj ne estas frontalaj, sed duonprofilaj. Tiam la okuloj povas situi sur unu el la vertikalaj linioj. Persono kiu rigardas dekstren, estas asociata kun futuro, espero; persono kiu rigardas maldekstren donas impreson de retrorigardo, pasinto, eble eĉ tristeco.

1.5. Ekvilibro

Zorgu ke via subjekto ne estu malagrabla oblikva en la foto, ĉar tio donas la impreson ke ĝi falos. Evitu do malstabilajn elementojn, ĉar ili ĝenas. (Krom se vi faras intence kaj bone! Do ne iomete, sed multe!) Ankaŭ kial la horizonto sur la bildo estu rekta.

Kiam vi lokigas pezan objekton sur la maldekstra linio (laŭ 1.4.), sed nenion en la kontraŭa parto de la foto, ĝi fariĝas nestabila ankaŭ. Do provu kompensi tion per alia objekto, ekz. arbo, la suno, ... Samtempe tio povas esti simetrio, alia utila tekniko en arto.



1.6. Perspektivo

Parolante pri fotoj, oni tre multe mencias la perspektivon. Kaj perspektivo, same kiel la Ora Tranĉo, estas aplikata jam de jarmiloj, ĉi-kaze speciale en arkitekturon, sed ne nur.



Ni distingas ĉefe jenajn 2 perspektivojn apud la kutima:

- agla perspektivo: desupre suben
- rana perspektivo: desube supren (vidu maldekstre)

Sed ekzistas pluraj aliaj eblecoj kaj ĝuste tio distingas foton disde alia, pli ordinara foto.

La sekva ekzemplo estas fotita "malalte antaŭen". (Do, kiel vidus formiko.) Ĉu plaĉas al la spektanto, dependas de lia/ŝia gusto kaj eble ankaŭ de la modo.



Dua elemento pri perspektivo, estas la dimensioj. Fotoj montras la 3-dimensian mondon sur du-dimensia plano. Sed, kiam oni spektas frontalan foton de konstruaĵo, nia cerbo scias ke certe ĝi estas 3-d, sed ĝi ofte vidas nur 2 dimensiojn.

Tamen, ekzistas 2 manieroj montri la trian dimension:

1. Profundeco. Ne fotu rekte fronte, sed fotu la angulon de la konstruaĵo, tiel ke ĝi ne aspektas simple plata. Male, la spektanto vidas la profundecon en la foto kaj do sentas la 3 dimensiojn. Komprenible, se oni volas emfazi la belan simetron de la fasado, oni ne apliku tiun ĉi trukon, kiu ja estas valora por montri alian flankon de la konstruaĵo.
2. Ombroj. Diversaj ombroj estiĝas kiam la suno prilumas objektojn kun diversa grandeco aŭ distanco de la observanto. Sekve, registrante objektojn kun iliaj ombroj, tio montras 3an dimension.



estu prefere pli tia:



1.7. (Gvidaj) linioj

Kiam vi faras foton kaj montras ĝin, vi volas ke oni rigardu ĝin; estas normale. Vi ankaŭ volas ke la bildo kaptas la okulon, ke ĝi estu tiel interesa, ke homoj ne post frakcio de sekundo jam rigardu la sekvantan foton, aŭ tutsimple aliloken.

En klasika kompozicio oni ofte uzis liniojn kiuj direktas la okulon en la bildon, al la subjekto. Tiuj linioj kvazaŭ prenas vin ĉe la manoj kaj kondukas vin al la temo.



En malbona kompozicio, maloportunaj linioj forĝvidas la okulojn, do la atenton, de la temo, sekve estas malsukcesa kompozicio.

Bonaj linioj :

- linioj kiuj de sub la foto iras rekte al la subjekto, ekz. konverĝaj linioj (fervojoj trakoj)
- kurba linio (S) kiu iras al la subjekto

Malbonaj linioj :

- linioj kiuj iras tro proksimen al la rando de la foto : la okuloj emas 'defali' de la bildo (= malagrabla)

Linioj en si mem povas esti tre interesaj en kompozicio (ritmo, geometrio, abstrakto, ...). Pri tio, legu en venonta ĉapitro.

2. Kompozicio

Ni jam parolis pri la Regulo de la Trionoj aŭ la Ora Tranĉo (paragrafo 3.1) kaj pri la perspektivo (ĉapitro 5). Ĉar ili estas plej gravaj, mi pritraktis tiujn temojn aparte. Sed ankaŭ aliaj elementoj konsistigas la kompozicion:

2.1. Simetrio



Simetrio estas plaĉa kiel temo aŭ elemento por fotoj. Ĉu natura simetrio, ĉu foje artefarita simetrio (kun spegulo aŭ per softvaro), aŭ la kompleta manko je simetrio, ekzemple tie kie vi normale atendus simetrian.

2.2. Ritmo

Sinsekvo de linioj en foto, ĉu arbaj trunkoj en longa vico, ĉu lanternoj, brikoj en muro, ŝtupoj de ŝtuparo estigas tiel nomatan ritmon. La ripeto de tiuj elementoj estas danko temo; dum foje ĝuste la interrompo de la organizita ordo povas esti tre speciala. La plej grava afero estas: vidi la ripetojn, la liniojn.



Ankaŭ aliaj ripetoj estas bonvenaj en foto. (Germane: *Leitmotiv*)

2.3. Ŝablono

Ŝablono estas termino uzata por paroli pri ripetataj strukturoj kiuj kutime plenigas la tutan foton kaj tiel formas abstraktan, izolitan aspekton de la mondo. Ekzemple brikoj en muro, seĝoj, amaso da staplitaj bierkestoj, bombonoj, povas formi ripetiĝantan ŝablonon.



2.4. Strukturoj

La homa haŭto, la malregulaj ŝtonoj de muro, la desegno en ligno formas strukturojn, kiuj povas esti interesaj por foti. Interesaj por montri al homoj ion kion ili ĉiutage renkontas, sed apenaŭ pririgardas.

2.5. Kontrasto

Fotoj povas montri diversajn kontraŭojn, kiel juna-maljuna, granda-malgranda kaj similaj aliaj 'mal'-paroj, kiuj estas malpli evidentaj ol la antaŭaj elementoj de kompozicio (simetrio, strukturo, ŝablonoj, ...) kaj sekve ofte tre aprezata.



Maldekstre vi vidas ekzemplon de kontrasto inter io kruda, fortika (roko) kaj io delikata (planteto).

Alia signifo de kontrasto estas la granda diferenco inter la diversaj kolor- aŭ ton-nuancoj ene de unu foto. Kiam la suno tre forte brilas, la diferenco inter helaj (sunaj) kolornuancoj kaj malhelaj (ombraj) kolornuancoj grandiĝas. Tio donas altan kontraston al foto kaj povas esti pli interesa ol tre 'monotona' foto. (Vidu ankaŭ la foton ĉe paragrafo 2.7.)

2.6. Kadro

Persono en strato, preĝejo, pejzaĝo, ofte aspektas pli bone se ĝi estas ĉirkaŭita de kadro, simile kiel plej multaj fotoj kiuj pendas sur muro estas metitaj ene de paspartuo, kiu formas kadron. La ideo de kadro estas zorgi ke la okuloj restas interne de ĝi, por kapti kaj teni la atenton, tiel ke la rigardo ne defalas de la bildo, ne ekvagas aliloken.

Estas tre bele kiam oni povas tiel kunmeti la bildon, ke iu objekto, aŭ aro de objektoj kune formas kadron ĉirkaŭ la subjekto. Tio povas esti arko aŭ pasejo de konstruaĵo, senvitra fenestro, arbo kaj pendanta branĉo.



Tamen, samtempe tiu ĉi tekniko estas iom tro fote uzata, tiel ke ĝi fariĝis iom 'klasika'. Kiel ĉiam, provu esti originala. Aŭ simple, teknike bona.

2.7. Simpleco

Elektu bone la subjekton kaj ne timu alproksimiĝi al ĝi, kiel dirite en ĉapitro 1. Tiel ĉi, spektanto de via foto ne devas mem provi eltrovi kio diable estas la subjekto, kion oni volas montri? Ĉu la aŭto, ĉu la persono, ĉu la ĉielo, ĉu la fosto aŭ la telefonbudo?

Nu, se la koloroj estas ege buntaj, la rezulto povas esti tre plaĉa. Sed se vi volas montri ion specialan pri la telefonbudo, tiam sufiĉas alproksimiĝi al la telefonbudo mem kaj lasi la aliajn detalojn ekster vido.

Se bone farita, ekstrema izoligo de la subjekto povas esti tre plaĉa. Tion oni nomas la "arton de la simpleco", aŭ: "malpli estas pli". Tio signifas: foje montrante malpli (da detalojn) oni estas pli allogita al la foto.



Minimalismo povas esti vazo sur fenestra breto, sen ajna plia detalo. Aŭ floreto sur plaĝo. La eblecoj abundas; provu mem, dirante pli per malpli.

2.8. Fokuso

Unu el la manieroj elimini ĝenajn elementojn en sceno, aŭ pli emfazi la subjekton, estas la uzado de selektema fokuso. Per pli bonaj aparatoj, oni povas varii la fokuson kaj mem decidi kio estu neta en la foto, kaj kio estu malneta.

Kiam temas pri homoj kaj bestoj, ideale estas kiam almenaŭ la okuloj estu nete en fokuso. Ĉio alia povas esti malneta. Ja la okuloj estas la plej universale alrigardata elemento en vizaĝo, certe de homoj, sed ankaŭ de bestoj. Se tio estas malneta, oni ne sukcesas bone taksi la bildon, la esprimon de la fotita subjekto.

Kiam temas pri nevivantaj objektoj, oni povas 'ludi' per la fokuso; aŭ simple fari plurajn bildojn de la sama subjekto laŭ diversa fokuso kaj poste elekti sian preferatan. Elektante, oni prefere sekvu sian intuicion. Se oni bone rigardas, ĝi finfine pravos. Se oni ne povas elekti, povus esti ke tutsimple ambaŭ same taŭgas.



2.9. Profundeco

Kiel jam aludita en ĉapitro 5 pri la perspektivo, defio estas montri 3-dimensian mondon sur 2-dimensia bildo.

Kiam temas pri konstruaĵo, oni povas foti ĝin de ĉe la angulo kaj tiel oni aŭtomate vidas ke ĝi estas ne plata, sed spaca.

Pri pejzaĝoj, alia Ora regulo estas: inkluzivu ion en la malfono (antaŭplano). Jen la klarigo: oni povas foti monton, sed havi neniun ideon pri la grandeco aŭ la distanco de la monto. Sed se oni inkluzivas simplan, proksiman arbeton en la foto, oni povas kompari tiun arbeton kun la monto kaj diri al si "ho kiom granda" aŭ "ho kiom vasta".




Kiam oni volas montri la imponan grandecon de klasika kolonaro, sed oni ne havas referencon, oni ne povas bone imagi tiun imponan grandecon. Male, se oni povas inkluzivi ekzemple homon "la mezuro de ĉiuj aĵoj" (kiel diris Protagoro, greka filozofa), oni povas vidi kiom foje pli granda estas la ŝipego, la kastelo, aŭ kiom malgranda estas la biciklo, aŭ la muso, aŭ la kabano de malriĉa indiĝeno.

2.10. Gvidmotivo (Germane: *Leitmotiv*)

Gvidmotivo estas revenanta elemento, kiu riĉigas la komponon. Ekzemple la ronda formo de fenestro povas aperi aliloke en la bildo, sub la formo de pilko.

2.11. Geŝtalto

Geŝtalto (el la germana Gestalt) estas tutaĵo, kiu ne estas egala al sumo de ĝiaj partoj. Alivorte: oni vidas pli ol fakte troviĝas en la bildo, aŭ: pluraj elementoj en la bildo elvokas ion ekstran, kio fakte estas tie. En la foto dekstre, la rustmakuloj sugestas la formon de vizaĝo.



2.12. La homo kiel referenco

Vi povas foti belan pejzaĝon, ekz. de bela monto aŭ rivero, sed ni ne povas diveni ĝian grandecon, do ne esti imponitaj, kiam ni ne havas referencon. Tial estas utile inkluzivi personon en la bildo, kiu servos kiel referenco. (Atentu tamen ke la persono aperas nature.) Eventuale ŝafo, ĉevalo, aŭ iu alia referencilo povas servi por la sama celo.



2.13. Dinamismo

Vertikalaj kaj horizontalaj linioj estas tre statikaj kaj ne donas dinamismon al foto. Diagonalaj linioj, male, estigas pli vigan etoson. (Kvankam ne troigu kaj konservu naturan aspekton de la tuto.)

Komparu simile:

- homoj kun la brakoj pendantaj – homoj kiuj mansvingas.
- sidanta hundo – kuranta hundo
- senmova aŭto – rapida aŭto

Ĉi tie, malneteco kaŭze de la moviĝo estas eĉ permesate!

Ankaŭ nekutima, malalta starpunkto povas estigi pli dinamisman bildon.



3. Kelkaj konsiloj por pli bonaj fotoj

3.1. Pli orda foto

Se estas tro da elementoj en la celilo, aŭ iuj elementoj kiuj ĝenas, estas pluraj manieroj 'kamufli' ilin. Io kio estas ofte preteratentata estas ekzemple strangaĵoj malantaŭ ies kapo. Ekz. fosto malantaŭ la kapo, kiu ŝajnas elveni el la kapo. Tiam, ofte sufiĉas simple fari paŝon flanken.

Foje okazis al mi ke mi volis foti rompitan vitron, sed mia reflekto videblis. Post nelonge mi trovis la solvon: fari kelkajn paŝojn malantaŭen kaj zomi pli proksimen por foti la saman aferon, sed sen mia propra reflekto. La sama truko utilas por eviti sian propran ombron. Ankoraŭ la sama truko helpas por forigi aliajn nedeziratajn elementojn proksime al via subjekto.

3.2. Bone konu vian fotilon !

Sciu kiamaniere fokusi je la dezirata objekto. Foje kiam vi volas fokusi je io en la antaŭplano kaj inkluzivi pli grandan parton de la fono, tio ne eblas rekte. Kutime, vi devas direkti la fotilon al la objekto kiun vi volas en fokuso, duonpremi la butonon, nur nun fari la definitivan kompozicion (do direkti la fotilon tiel kiel vi intencas fari la foton) kaj plene premi la butonon.

Same estas por mezuri lumon en alia loko ol en la definitiva loko.

3.3. Bone konu vian fulmon (kaj ĝiajn limojn)

Kiam oni uzas ordinaran fulmon en profunda ĉambro, la objektoj proksime al al fotilo estos tre helaj, la objektoj en la fono tre malhelaj. Se oni povas ignori la fonajn objektojn kaj negravas ke ili ne aŭ apenaŭ videblas, neniuj problemoj. Se oni ankaŭ volas la fonon neta, oni ne havas alian elekton ol uzi ekstran lumon. Se oni ne havas ankaŭ tion, provu pli longan eksponaŭron. Se ankaŭ tio ne eblas pro moviĝantaj homoj, vi devos kontenti kun bildo kiu montras multe da bruo aŭ makuloj. Feliĉe, ekzistas softvaro por iom korekti tion, sed neniam vi havos perfektan bildon tiumaniere.

Io kion oni ja povas pli facile fari, estas korekti troan eksponon pro la fulmo. Ekzemple oni volas vespere aŭ nokte foti tabulon aŭ ion alian kaj la fulmo kaŭzas blankan makulon pro ĝia forteco. Oni povas iom iri malantaŭen, sed tiam la fulmo malpli efikos. Alia solvo estas per fingro kovri la fulmon, sed tio postulas iom da ekzercado, ĉar foje tio kaŭzas parte tro malhelan kaj parte tro helan bildon. Alternativo estas meti ion antaŭ la fulmo kio iom filtras la lumon, ekz. poŝtuko, papero, ...

Por nemoviĝantaj objektoj, kaj se via fotilo permesas, faru foton per longdaŭra ekspono. Certe per ciferecaj fotiloj, la koloroj estos tre belaj.

3.4. Lumo-mezurado

Fotografio estas la registrado de lumo. Kompreneble, konstruaĵoj kaj monumentoj normale mem ne lumas, sed ili reflektas la sunlumon. Tiel ĉi, niaj okuloj povas vidi ilin. Tiun lumon registras ankaŭ la fotilo, ĉu per elektronika sensoro, ĉu per lumsentema filmo.

Speciale ekstere, ni konfrontiĝas kun du lumoj kun malsama intenseco:

- unuflanke ni havas la rektan, senperan sunlumon; kiu estas tre forta, eĉ en ombra tago;
- aliflanke ni havas la reflektatan lumon, ekzemple de konstruaĵoj, personoj ktp., kiu estas malpli forta.

La homa okulo, kiu estas ligita al multaj nervoj, kapablas samtempe klare vidi intensajn lumojn kaj malpli intensajn lumojn, kompreneble ankaŭ kun certaj limoj. Tamen, niaj nervoj povas ja pli bone kompensi la diversajn lumfortojn. Tion ĉi, normalaj fotiloj ne kapablas fari. (Nur altkostaj profesiaj modeloj kapablas.)

Rezulte, multaj ne-profesiaj fotiloj havas malfacilaĵojn bone mezuri la lumon, kaj la korespondan eksponaŭron. Por solvi tiun ĉi problemon, plej multaj fotiloj permesas jenan trukon:

Kutime, ekstere, oni volas foti la konstruaĵon aŭ alian monumenton. Se ĝi okupas la ĉefan parton de la foto, normale la lumo-mezurado okazas senprobleme. Sed, kiam granda parto de la bildo konsistas el la ĉielo, kun intensa lumo, la fotilo tre ofte tiel mallongigas la eksponaŭron, ke la konstruaĵo aspektas tre malluma, sed la ĉielo videblas tre bone. Tio ankaŭ okazas kiam oni volas foti fenestron (aŭ muron kun fenestro) kiu enlasas brilan lumon de ekstere. Tiu ĉi situacio estas sufiĉe facile solvebla jene:

Direktu la fotilon tiel ke la intensa lumo ne falas sur la fotilo kaj duone premu la obturilon. Tiam ĉi, la fotilo mezuras la lumon sen interfero de la rekta sunlumo. Poste, direktu la fotilon al la subjekto kaj premu la obturilon komplete kaj la definitiva foto estas farita. Nun, se ĉio iris bone, la subjekto ne aspektos tro mallume sur la foto. Tamen atentu ke dum la duonpremo de la obturilo, la fotilo mezuras ne nur la lumon, sed ankaŭ registras la fokusdistancon. Do, zorgu ke la distanco inter la surfaco sur

kiu vi mezuras la lumon kaj la subjekto ne diferencas. Ekzemple, por foti monumenton, direktu la fotilon al la pli malalta parto por mezuri la lumon, ekzemple al la soklo, poste re-altigu la fotilon por fari la definitivan foton.

Malavantaĝo estas tiam ke belega ĉielo kun belaj nuboj aspektas tro hela ĉar la ekspondaŭro estis bone por la monumento, sed ne por la ĉielo, tiel ke oni ne vidas ankaŭ la belecon de la ĉielo. Nu, ĉar tio estas ligita al la limoj de kapablo de la fotilo, necesas elekti: aŭ oni bele fotas la monumenton, aŭ oni bele fotas la ĉielon.

Feliĉe, ekzistas solvoj ankaŭ por tio: La plej perfekta solvo estas: fari plurajn fotojn kun diversa ekspondaŭro. Unu foton kiu bele registras la ĉielon, alian kiu bele registras la monumenton. Poste oni kombinas tiujn fotojn. Por bone fari tion, la punkto de kie oni fotas devas esti ekzakte la sama. Do praktike oni bezonas tripiedon por tiaj fotoj. la fotojn oni poste kombinas per softvaro. (Sed lerta fotisto ankaŭ scipovas fari tion en obskura ĉambro.)

Alternativa solvo estas: uzi softvaron por korekti la foton. Pri tio, vidu la parton kiu temas pri manipulado de fotoj.

3.5. Uzi la ISO-agordojn.

Speciale en ciferecaj fotiloj, oni povas adapti la ISO-valoron. La ISO-valoru rilatas al la tradicia 'filmrapideco' aŭ pli bone 'filmsentemo'. Ju pli alta ISO-valoru, des pli sentema la filmo estas. Pli sentema filmo necesas ekzemple for endoma fotado, ekzemple ISO-valoru 400 aŭ 800. Atentu tamen ke ĉi tie la kvanto de granulo altiĝas, kio ne ĉiam estas dezirata. Pli malalta ISO-valoru, rezultas en malpli sentema filmo, aŭ sensoro.

En tre lumaj cirkonstancoj, fotilo kutime mem elektas uzi ISO-valoron de 100, kiu estas tute bone.

En kelkaj cirkonstancoj, oni devas mane agordi la ISO-valoron. Ekzemple, okazis al mi ke mi faris fotojn de fungoj en arbaro. La surfaco de la fungo estis blanka, do reflektis pli da lumo ol la ĉirkaŭaĵo de brunaj folioj. Pro la fakto ke mi ne estis en plenaera kampo, sed sub arboj, la fotilo aŭtomate altigis la lumsentemon al 400. Kiam mi fotis la fungon, ĝi aspektis tro hela, tiel ke apenaŭ videblis detaloj de ĝia strukturo. La fungo do estis superekspozita. En tiu ĉi kazo, mi mane agordis la ISO-valoron al 100, kio rezultis en multe pli bona bildo.

Alia ebla solvo estas adapti la ekspondaŭron. Nome, la fotilo mezuras la lumon kaj konkludas ekspondaŭron. Tamen, vi povas decidi ke ĝi eksponu iom pli longe ol mezurata aŭ malpli longe ol mezurata. La ekspondaŭron oni povas kutime variigi inter +2 (pli longa ekspono) kaj -2 (malpli longa ekspono) en pluraj etapoj.

Nuntempe la fotiloj ankaŭ permesas limigi la ISO-valoron por eviti troan granulon. 400 estas sekura maksimumo, 800 ankoraŭ akceptebla, pli altaj ISO-valoroj donas malbonan rezulton.

3.6. Noktaj fotoj

Longa ekspono.

Dum nokto, vi disponas pri malpli da lumu, do necesas pli longa ekspono. Eĉ sufiĉe simplaj fotiloj permesas longan eksponon, eĉ se foje iom limigita (ekz. 10 sek., 30 sek., 1 min., 3 min., 5 min.), sed estas ĉiam pli bone ol nenio. Eksperimentu kaj se necese, poste plibonigu per komputilo.

Tripiedo.

Tripideo estas necesa por ke la fotilo ne moviĝu dum longdaŭra ekspono, kaŭzante malnetan (movitan) foton. Mi mem oftege promenas kun fotilo, sed maloftege (preskaŭ neniam) kun tripiedo pro ĝia amplekso.

Solvoj (en ordo de utilo):

- Ekzistas poŝformataj tripiedoj, kiujn oni facile povas meti en sian fotilan sakon aŭ eĉ poŝon. (kombinenda kun ĉi-sekva ero :)
- Objektoj en ĉirkaŭo sur kiujn oni povas meti la fotilon (aŭto, muro, barilo) (per membrokartoj k.s. sub la fotilo, oni povas klinigi la fotilon alten)
- Lanternfosto aŭ trafiktabula fosto, kontraŭ kiun oni premas la fotilo dum ekspono. Ne perfekta solvo ĉar estas ege malfacile teni siajn manojn senmovaj, sed la apogo de la fosto helpas.

Prokrastita ekspono:

Ĉar premado de la butono kutime kaŭzas moviĝeton de la fotilo, sekve malnetan foton, estas utile eksponigi kun ekz. 1 aŭ 3 sekundoj da prokrasto. Ĝuste sufiĉe por ke la fotilo stabiliĝu antaŭ la ekspono.

3.7. Diskrete foti homojn

1. Malŝaltu elektrajn bruojn kaj klakojn se eblas.
2. Ignoru la fotitan personon komplete se vi vidas ke tiu reagas. Rigardu iom malantaŭ aŭ apud la persono kaj foriru kvazaŭ nenio okazis.
3. Se la persono tamen alparolas vin, simple diru ke vi fotis ion alian.
4. Ĝisnun mi neniam estis vere ĝenita de iu kiun mi fotis. Mi ja atentis ne foti danĝerajn homojn...
5. Alia truko : tenu la fotilon tiel ke vi povu foti ekz. de brustonivelo. Kiam la fotilo ne troviĝas antaŭ la okulo, oni malpli supozas ke vi fakte fotas. Tio estas kompreneble malpli certa maniero, sed pli amuza kaj certe ekzercenda!

3.8. Aliaj konsiloj rilate fotadon de homoj

- Kiam vi uzas fulmon en ĉambro, zorgu ke la fotito ne staras tro proksime al muro, alikaze ombro falos sur la muron malantaŭe. Provu uzi taglumon, ekz. apud fenestro, aŭ malŝaltu la fulmon. Se vi havas la materialon, uzu plurajn fulmilojn. Se ne, sed via fulmilo estas adaptebla, provu foti kun la fulmo direktita supren, tiel ke la fulmlumo atingos la fotaton de supre kaj ombro ne falos sur la muron malantaŭe. (Ja atentu, povas esti ke tiam la mentono aŭ kolo havas ombbron. Spegulo aŭ alia reflektilo helpas tiukaze.)
- Fotu samnivele, ekz. infanoj fotitaj de supre aspektas malbele, ankaŭ de tro malalte aspektas malbele. Krom: se vi serĉas la specialan efikon. Ekz. forta viro aspektas pli impona se fotita de iom pli malalte, certe se li aspektas iom timige.
- Zorgu ke ne forfalu malgranda parto de ekz. orelo, aŭ parto de hararo. Vi ne ĉiam devas foti la personon aŭ eĉ nur la kapon komplete, sed zorgu ke ne forfalu nur iomete. Kiam la kapo ne estas komplete sur la foto, estu klare ke estis intence.
- Kiam vi fotas personon kontraŭlume, la vizaĝo ofte estos malhela. Ne timu, eĉ dum sunplena tago, uzi vian fulmilon por doni lumon al la vizaĝo. Ankaŭ en aliaj cirkonstancoj tio utilas; nur: de pli ol 1 metro, la atingopovo de la fulmilo estas jam tre malgranda!

- Direkto de la okuloj: kiam la fotito rigardas dekstren, do 'antaŭen', tio pensigas pri estonto; kiam fotito rigardas *maldekstren*, tio donas *retrospektivan impreson*.

3.9. Ĉu konservi kolorojn?

Estas malfacile doni ekzaktajn gvidliniojn. La baza ideo unuflanke estas : se la koloroj ne gravas por tio kion vi volas esprimi, vi povas forigi ilin. Aliflanke, ne eblas ignori la longdaŭran tradicion de nigre-blanka foto. Por iuj temoj, speciale kiam oni fotas strukturojn, nigra-blanka foto simple estas pli 'forta'.

Gravas, kiel ĉiam, ke la okulo estu fiksita al la subjekto. En kazo de strukturoj, koloroj ĝenerale malhelpas.

La sama truko utilas kiam apud via subjekto aŭ en la fono troviĝas tro helkoloraj elementoj, ekz. helblua aŭto, ruĝa aŝio, ... Reduktante la kolorojn, la subjekto pli bone elstaros. Nuntempe softvaro permesas forigi la kolorojn nur de parto de foto. Tiel ĉi, oni povas nigra-blankigi la fonon, konservante la kolorojn de la temo. Tio povas esti tre bela, sed povas ankaŭ doni tre 'artefaritan' impreson.



3.10. Prenu distancon aŭ petu opinion

Foje vi prilaboras iun foton kaj ne plu povas elekti inter la rezulto kaj la originalo, ĉar vi tro longe fikse rigardis laborante.

Foje helpas fari ion tute alian kaj (eble eĉ la postan tagon) reveni por rigardu ankoraŭfoje. Preninta ion da distanco, oni povas pli objektivite juĝi. Se eblas, vi ankaŭ povas demandi opinion de alia persono. Mi persone trovas la retejon www.ipernity.com tre utila por tio.

4. Postaj plibonigoj de foto

4.1. Ĝustigo de koloroj

Multaj fotiloj ne ĝuste redonas la ĝustajn kolorojn pro diversaj kialoj: malpli kvalita sensoro, malpli kvalita optiko (lensoj k.s.), lumdisperso, foti tra fenestro, la fakto ke la homaj okuloj kompensas aferojn dum fotiloj tion NE faras ...

Kutime necesas fari gama-korekton kaj kontrasto-altigon, por ne havi malviglan, malinteresan bildon.

Gama-korekto zorgas pri tio ke malhelgrizo pli proksimiĝas al nigro, sed griziga la blankajn partojn de foto (gama-valoro malpli ol 1), aŭ male (gama-valoro pli ol 1).

Kontrasto-altigo forprenas la grizan zonon de bildon, samtempe blankigante helgrizon kaj nigrigante malhelgrizon. SED: atentu ke vi rapide perdas fajnajn detalojn en strukturo kun kontrasto-altigo. (Ĉe silueta bildo, ĝuste tio estas la intenco!)

Saturado zorgas pri tio ke la koloroj fariĝas pli intensaj.

Foje fotu herbon aŭ ruston kaj revenu kun la foto (aŭ ekrano) al la originala loko por vidi la diferencon.

Mi uzas la senpagan Irfanview por rapide spekti fotojn, plibonigi kolorojn kaj apliki maskojn (vidu poste).

4.2. Kamuflado de malperfektaĵoj

- Plej ofte uzata, eĉ en klasika fotografio: retuŝado. En cifereca epoko tio kutime estas: kopii bonan parton de foto super malbona aŭ nedezirata elemento en la foto.
- Uzi t.n. soft-efikon: foje tio helpas por bonigi ne tute netan foton.
- Silueto: kiam la koloroj tute ne estas interesaj, aŭ la tuto eĉ iom grizaĉa, foje eblas tamen elfari belan bildon, konvertante ĝin al silueta bildo. Tiel ĉi, oni reduktas la foton al la minimumo, nome: la formojn de la objektoj en la bildo.
- Altigi kontraston por plispicigi foton
- Forigi la kolorojn (konverti al nigra-blanko) tio helpas por kamufliti tro atentoraban elementon en la fono aŭ ĉirkaŭaĵo de la subjekto. Se vi volas konservi koloran bildon, ofte eblas simple malsaturigi nur tiun ĝenan elementon.
- Diversspecaj kromprogramo (maskoj) ekzistas por plibeligi foton. Iuj forigas bruon, aliaj netigas la bildon, aliaj havas aliajn meritojn. Se uzataj kun modero, ankaŭ tio povas helpi. Ekzistas pluraj senpagaj, inter kiuj mi ŝatas "Beautiflier" de la kompanio *Red Paw Media*.

4.3. Aliaj konsiloj

- Pro tio ke estas malagrabla kiam okuloj defalas de la foto, delonge uzata tekniko estas la malheligo de la randoj de la foto. Klarigo: helaj partoj en foto allogas la atenton. Zorgante pri tio ke la randoj estas pli malhelaj, la okuloj restas pli bone en la foto. Tiu ĉi tekniko estas iom analoga al la uzado de paspartuo.

5. Senkosta fotostudio

Kiam oni ne havas la rimedojn aŭ spacon instali kaj uzi veran fotostudion, necesos elturniĝi aliamaniere.

Por ne tro grandaj projektoj utilos jenaj aferoj:

- (buro)lampo por lumigi ne tro grandajn objektojn
- (kungluitaj) paperfolioj povas servi kiel fono (ĉu blankaj, ĉu nigraj aŭ alia koloro)
- (blanka) muro kiel fono
- tukoj kiel fono, SED: atentu faldojn kaj ĉifojn.

(Kiam vi devos kunglui paperon por kovri pli grandan surfacon, ofte necesos poste kamufliti la juntojn.)

6. Ekzercoj

6.1. Imitado

Kiam vi havas la tempon, foliumu fotografiajn librojn kaj revuojn. Simple kiel ekzerco, demandu vin kiamaniere la fotisto faris la foton. Provu fari similan foton; vi renkontos malfacilaĵojn kaj lernos solvi ilin. (La celo de tiu ĉi ekzerco kompreneble estas *lerni*, ne *papagi*.)

6.1. Variado

Variado estas la plej bona kaj instrua tekniko por lerni rigardi el diversaj vidpunktoj kaj provi trovi novajn perspektivojn.

Variado en tiu ĉi kunteksto signifas:

- rilate la temon: provu kaj komparu diversajn alirojn, angulojn, perspektivojn, aperturojn, distancojn, fokusojn, kadrojn
- rilate la postprocedon: provu diversajn eblecojn finlabori vian foton: koloroj, nigra-blanko, k.s.

Komparu ĉu tie jenajn tri ŝtupojn:

1. Faru laŭeble neŭtralan bildon, rilate perspektivon kaj postprocedon por povi kompari
2. Trovu tiun version kiu plej bone prezentas la temon
3. Faru nekutimajn versiojn, eksperimentante ĝis la diversaj ekstremoj, lasante malnovajn padojn, provante novajn aferojn

La plej originalaj, sed ofte ankaŭ la plej simplaj, estas la plej okulfrapaj kaj memorataj fotoj.